# Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 4; februaro, 1985.


## Malkovrinda lando, Kameruno.

Kun marbordo de nur kelkaj centoj da kilometroj sur la Ginea Golfo, iom norde de la ekvatoro en okcidenta Afriko, sed kun longegaj teraj landlimoj etendiĝantaj norde ĝis la Lago Ĉado, staras ankoraŭ malkovrinda lando kun la nomo, Kameruno.

Dise sur la duonmiliono da kvadrataj kilometroj de la lando, loĝas sep milionoj da enloĝantoj, kiuj kultivas la riĉan, fekundan teron en la sudaj regionoj, kaj vagadas por trovi novajn paŝtejojn en la nordo. En tiu lando, kiu rajtas fieri pri la plej alta monto en okcidenta Afriko, troviĝas ankaŭ almenaŭ unu grupo da Esperantistoj. Nia Fakgrupo rajtas fieri pri tio ĉi, ke la plej aktiva Esperantisto en tiu lando estas membro nia.

Ne necesis, ke S-ro Jean-Marie [?]ge Mbele aparte deklaru al mi, k[?]li amas sian patrujon, ĉar tiu sento estas klare legebla inter la linioj de ĉiuj leteroj de li.

Kiam li aludas al sia propra urbo, Douala, (duala), li nomas ĝin la plej grava centro kaj ekonomia ĉefurbo de la lando, urbo pri kiu ekzistas onidiro, ke "mono kuŝas tie kiel sablo", por tiuj, kiuj pretas unue fari investon.

Kiam li aludas al Lago Ossa, "turisma centro ne fore de Douala" kiu "allogas vizitantojn", li sendas belajn bildkartojn por doni emfazon. Aludante al la fervoja sistemo, (certe ne la plej ampleksa en Afriko!), li asertas, ke ĝi ligas ĉiujn "gravajn, la plej utilajn, centrojn", kaj "per aŭtovojoj, pli-malpli bonaj, oni atingas la ceterajn centrojn, gravajn aŭ malpli gravajn." Kaj kelkaj lokoj estas atingeblaj per aviadilo!

Pri turismo: "Oni ne timu! Ĉiam eblas plenumi ĉiajn bezonojn".

Serioze priskribante sian landon, S-ro Mboge deklaras, ke ĝi estas riĉega lando kiu restas ankoraŭ preskaŭ virga. Ĝi prezentas, en la komerca senco, ne-nombreblajn eblecojn ekspluati la riĉecon de la lando, al tiuj kiuj disponas pri la necesaj energio kaj kapitalo, kun ĝusta komerca filozofio por kapti la ŝancojn.

Samtempe, kompreneble, ĉiu tia projekto, ekspluati la eblecojn, helpas plialtigi la vivnivelon de la enloĝantoj, kaj nia samideano indikas, ke la sento voli helpi la enloĝantojn estas esenca parto de la koncerna filozofio necesa.

Plej emfazenda estas la gravega rolo de kapitalo. La lando mem ne disponas pri la necesa kapitalo ekspluati la fekundecon de la grundo aŭ la riĉecon de la naturaj trovataĵoj. Necesas, ke tiu kapitalo venu el eksterlando.

Sed konata sinteno en la lando estas, ke "oni helpu por esti helpata; oni amu por esti amata." Sendube, kapitalistoj pretaj helpi en la evoluado de tiu lando trovos ĉie kunlaborantajn manojn pretajn.

Pro kiaj varoj oni malkovru tiun ĉi laŭdatan landon?

S-ro Mboge asertas, ke "prod-

uktaĵoj abundas!" Ĉe la kapo de la listo staras la konataj tropikaj fruktoj, (oranĝoj, mangoj, avokadoj, bananoj, ananasoj kaj kokosoj), kune kun ne-tiel-konataj fruktoj kiel gojavoj kaj sovaĝaj prunoj. Gravaj produktaĵoj, ankaŭ fruktaj, estas kakao, kafo kaj kotono, kaj diversaj oleoj, ekz. el palmoj, estas haveblaj. Pluraj specoj de lignoj estas menciitaj, kun apartaj mencioj de kaŭĉuko natura kaj diversaj nuksoj.

Laŭ skalo de volumeno, ŝajnas ke ligno estas la plej grava eksportata varo, kvankam laŭ skalo de valoro, kafo kaj kakao havas la unuajn lokojn. Ne estas mencio de mineraloj eksportataj, sed ne forgesita estas komerco en feloj kaj ledo.

Nia membro asertas, ke Kameruno estas turisma lando en sia propra maniero. Ĉiujare, la lando allogas eksterlandanojn el Eŭropo kaj Usono, turistoj kiuj iras unue al Douala, kiu estas ne nur bela urbo ĉiaokaze sed ankaŭ provizita per multaj komfortaj hoteloj. El Douala oni iras por fari ekspediciojn, aŭ por rigardi la belaĵojn troveblajn inter la lagoj, ebenaĵoj kaj montaroj, aŭ por ĉasi sovaĝajn bestojn en sovaĝaj regionoj, kie tute ne troviĝas hoteloj. Por tiuj, kiuj volas nenion alian ol ripozadon en bela klimato, oni povas proponi elekton inter kelkaj apudmaraj plaĝoj.

La plej utila lingvo nunatempe en Kameruno, por eksterlandanoj, estas la franca. Sed jam oni tie malkovris la internacian lingvon. Ĉu nun la Esperantistoj estas pretaj malkovri la mirindan landon kiu estas Kameruno, kaj per tio helpi ne nur la floradon de la internacia lingvo, sed ankaŭ la prosperon de meritplena lando?

S-ro Mboge staras preta etendi helpeman manon!

Lorenc' Mi

(Adaptita el originalaj raportoj de S-ro Mboge.)

---

## Administrado kaj financoj.

Jam vi legis sur la unua paĝo gravan novaĵeron : la Fakgrupo adoptis sian nomon!

Ekde nun ni estas rekonataj sub la nomo:

Internacia Komerca
kaj Ekonomia Fakgrupo,

kaj jam en prilaboro estas la desegnado de taŭga leterpapero kaj aliaj bezonaĵoj. Ni adoptis la mallongigojn, I.K.E.F. kaj IKEF, (kvankam tre verŝajne nur la dua estos vaste uzata), kaj ni invitas nun proponojn por taŭga insigno adoptebla por ni.

Sekve de la adopto de formala nomo, ni verkis proponon por Statuto por la Fakgrupo. Tiu propono aperas kiel integra parto de tiu ĉi Novaĵletero, kaj ni urĝe petas al vi ĉiuj, studu kaj pripensu ĝin. Esperebie, tiu propono estiĝos la oficiala Statuto, post akcepto dum la fondkunveno en Aŭgsburgo, sed ĉu ĝi trovos akcepton en la nuna formo, aŭ nur post amendoj, dependas je vi, la Membroj.

La fona ideo, dum verkado de la propono, estas ke ĝi taŭgu por eble la unuaj kvin jaroj de la vivo de la Fakgrupo. Pro tio, la propono estas sufiĉe ampleksa por meti firman grundon sub la piedoj de Estraranoj kaj Konsilantoj, sed tamen ankoraŭ iom skiza pri agadplanoj, por ebligi fleksebla sintenon dum la evoluo de aferoj.

Se vi pensas, ke ŝanĝoj estas necesaj, bonvolu formale fari vian proponon en la formo de aparta letero. Depende je la nombro kaj amplekso de la proponoj por ŝanĝoj, ni elpensos taŭgan metodon por prikonsideri ilin.

Nia espero estu klare priskribita: ni preferus proponi al la fondkunveno jam interkonsentitan vortumadon de la Statuto, por ke ĝi estu tie akceptita sen lastmomenta ŝanĝo. Agu nun, do, ni petas, se la propono havas gravajn mankojn aŭ makulojn viaopinie!

Ĉu aŭ ne tiu Statuto-propono estos akceptita sen ŝanĝe, certe estas, ke dum la fondkunveno ni devos formale elekti gvidantaron por la Fakgrupo. Ankaŭ por tiu ago, estus pli bona aranĝo koni la nomojn de kandidatoj jam longe antaŭ la komenciĝo de la kunveno. El tiu konstato leviĝas du petoj al vi: sciigu al ni la nomojn de jamaj Membroj, kiuj ricevus vian aprobon dum la elektoprocedo, aŭ sciigu al ni vian pretecon esti alelektata al funkcio, se alia Membro proponos vian nomon.
Ambaŭ agoj estas gravaj por ni! [illegible]rigu ilin gravaj ankaŭ por vi!

Alia sekvo de la adopto de formala nomo estas la komenciĝo de nova varbkampanjo. Baldaŭ vi vidos la reklamanoncojn jam menditajn; en preparo estas modesta varbilo, kiun ni proponos por ĝenerala uzado. Ambaŭ paŝoj kostas monon; tiu mono devas esti provizita de niaj membroj. Ju pli longa estas nia membrolisto, des malpli profunde niaj Membroj devas fosi en la monpoŝojn! Helpu nin per varbado. Helpu nin per mondonacoj. En la nuna stadio de evoluo, la dua el tiuj admonoj estas la pli grava, kaj denove ni devas peti vin, ne prokrastu pagi vian kotizon, se vi ne jam ĝin pagis, kaj aldonu kontribuon al la kapitalo, se iel eblas al vi. Se vi loĝas en lando kun transpagaj problemoj, skribe avertu nin pri via malfacilaĵo, ĉar povas esti, ke ni konas solvon por vi.

Feliĉe, ni lastatempe ricevis tre malavaran donacon.
S-ro Willy Voit, en Okcidenta Germanio, pagis grandan sumon por ke li estu la unua Dumviva Membro de la Fakgrupo, sed li aldonis sumon sufiĉan por pagi la bazajn kostojn de la jam menciitaj reklamanoncoj. En privata letero, ni jam dankis S-ron Voit en la nomo de la Fakgrupo, sed kun plezuro ni prenas tiun ĉi okazon publike agnoski nian ŝuldon al li. Ne eblas al ni ĉiuj tiel malavare subteni agadaron kiu havas nian aprobon, sed ni ĉiuj rajtas senti feliĉon, ke ni kune estas Membroj de la sama unuiĝo.

Du Membroj montris malavaran subtenon en alia tre valora maniero. S-roj Hagemann kaj Braun faris pagojn al la Subtena Fondaĵo por ebligi membrigon de kandidatoj en landoj kun transpagaj malfacilaĵoj. Ni anoncos pliajn detalojn en la proksima Novaĵletero, sed prenas tiun ĉi okazon kaj danki la du mecenatojn kaj memorigi vin pri nia apelacio en la lasta Novaĵletero.

Nia Prezidanto, S-ro Braun, alportis alian brikon al nia fundamento, lastatempe, per pensiga artikolo en revuo MONATO. Sub la titolo, Bremsita ekonomia optimismo, la artikolo reliefigas plurajn ecojn de la ekonomia fono de la nuntempa situacio en Okcidenta Germanio, kaj faras komparojn inter tiu lando kaj aliaj industriaj landoj per indicaj ciferoj.

La Redaktoro de MONATO, per ne kutima enkonduka noto, aparte bonvenigis la artikolon, menciante nian Fakgrupon, kaj etendis seriozan inviton al aliaj membroj niaj proponi similajn artikolojn por la revuo. Tiun inviton ni varme subtenas. La revuo MONATO pretas esti la tribuno de la Fakgrupo, por tiel diri, per aperigo de ekonomiaj studoj diversaj, en maniero kaj amplekso tute ne eblaj en tiu ĉi modesta Novaĵletero.
MONATO ĉiam serĉas seriozajn artikolojn, kun tabelojn de statistikaj donitaĵoj, aŭ grafikaĵojn de rezultoj, aŭ fotografaĵojn, kaj ankoraŭ serĉas kunlaborantojn en multaj landoj por malpli seriozaj laboroj.

En la komerca kampo, MONATO serĉas kunlaborantojn pretajn varbi reklamanoncojn de entreprenoj, kaj pretas atribui malavaran tantiemon al ĉiu varbanto. En la kazoj de varbado pere de membroj de la Fakgrupo, facile estas aranĝi transpagon de la tantiemo al nia kaso, kiel donaco en la nomo de la varbanto!
Plej eble ni baldaŭ povos anonci la unuan tian reklamanoncon flanke de mondkonata entrepreno.
Sed ne atendu nian anoncon pri ĝi! Abonu nun al MONATO kaj tiel legu pri ĝi!

Ne forgesu, tamen, la bezonon de mallongaj raportoj por tiu ĉi, via propra organo. Ĉu la preteksto estas la severa vintra vetero, tie ĉi en Eŭropo, aŭ ne, ni ne scias, sed certe estas, ke la kvanto de poŝtaĵoj estas konsiderinde malpli en la lastaj semajnoj ol pli frue. Ni tamen konservas por la proksima kajero temon certe aktualan por nia Fakgrupo: pensoj pri la labormetodo sekvota dum kolektado de materialo por eventuala nova eldono de IKEV. Oni povus senfine diskuti pri la teorioj malantaŭ la laboro, sed baze ĝi estas simpla afero. Ni bezonas aktivulon, pretan lerni la fakon dum laborado en kaj pri ĝi; aktivulo kiu laŭnature ŝatas sistemigitan laboron kaj kiu ja disponas pri libera tempo. Ni, la Fakgrupo, devas disponigi al tiu aktivulo la necesajn financajn rimedojn.

Se vi volas proponi tekston pri tiu ĉi temo por la proksima kajero, bonvolu noti la limdaton: la 19-an de aprilo en Roterdamo. Kaj nepre memoru, ke al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj!

LM

- - - - - - - - - o - - - - - - - - -

## *Nia peradservo.*

Legado de multaj proponoj al ni, (proponoj, tamen, foje iom nebulaj!), ni konstatas, ke inter niaj informpetantoj vere troviĝas tiuj Esperantistoj, kiuj ja volas havi la ŝancon negoci internaciskale, eĉ se nur en relative modestaj kvantoj kaj ritmo. Ni pensas, ke ni povas fari valoran servon se ni sukcesus ebligi kontaktojn inter vendontoj kaj aĉetontoj.

Jam foje ni aludis al proponoj. Unu tia jam bone funkcias: la ebleco akiri perpoŝte ekzempleron de la libro, La Nobla Korano, per pago al nia kaso en la sumo de kvindek guldenoj. Kaj jam en la ĉefartikolo ni faris rektan aludon al varoj haveblaj en Kameruno.

Lastatempe venis interesa propono el Ĉeĥoslovakio, kie aspiranto ne nur komercas mem pri produktaĵoj sekve de abelbredado, sed ankaŭ havas rilatojn kun banloko, kie la specialaĵo estas naturmetoda kuracado de reŭmatismo.

El Hungario venis detaloj pri ekipaĵoj per kiuj hejti domon aŭ alian konstruaĵon utiligante sunenergion, kaj pri aliaj disponeblaj servoj.

Nia kontakto en Sri-Lanko ankoraŭ serĉas eblecojn peri la konatajn produktojn de tiu insulo, kaj informpetanto en Ĉinio lastatempe petis kontaktojn kun komercistoj volantaj starigi negocojn kun tiu lando. En Pollando, ni havas kontakton kun la konata turistagentejo, kaj en Hispanio kun la ŝuindustrio. Ne mankas kontaktojn en suda Ameriko; niaj kontaktoj ampleksas mondskale!

Kaj via rolo en tio ĉi?

Pensu dinamisme kaj pozitive pri la eblecoj eĉ en via urbo, efektivigi kontaktojn inter importanto(j) kaj niaj eksportpretaj samideanoj.

Pensu jam nun pri ebla bezono via dum iu proksima festsezono, fari donacon al amiko. Pere de niaj kontaktoj, eblas akiri aparte interesajn suvenirojn de manlaboro el Afriko, Azio aŭ aliloke.

Aŭ pensu pri turisma vojaĝado kun diferenco. Ni havas la kontaktojn!

Provu la uzadon de la servoj jam malfermiĝantaj por vi. Subtenu la Fakgrupon je kiu vi estas Membro!

- - - - - - - - - o - - - - - - - - -

Pri pagoj al ni.

IKEF ankoraŭ uzas la poŝtĉekkonton, 361 47 95 en Nederlando, de Mondk. Eld. Esperantista, je la adreso: P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam.

Bonvolu adresi internaciajn poŝtmandatojn same. La kotizo restas je dudek guldenoj por 1985 kaj tre bonvenaj ankaŭ estus pagoj por pluraj jaroj en anticipo.

Respondeculo por la Novaĵletero estas ankoraŭ: S-ro L. Mee.

# STATUTO
de la
Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

PROPONITA por akcepto, dum ĝenerala kunveno de la Membroj okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, en Aŭgsburgo, dum julio, 1985.

1. Titolo. La nomo de la unuiĝo estas: Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, (I.K.E.F. aŭ IKEF), prialudita dum la cetero de tiu ĉi Statuto kiel 'la Fakgrupo'.

2. Sidejo kaj ekzisto-daŭro.

La sidejo de la Fakgrupo estas en Rotterdam, Nederlando, kie la Fakgrupo havas ekzistorajton sen tempolimo. Tiu ĉi artikolo neniel malebligos translokigon de la sidejo se ŝanĝitaj cirkonstancoj indikos la utilecon de tia translokigo, nek limigon de la ekzistodaŭro, se ankaŭ tio estas kaŭzita de ŝanĝo en la cirkonstancoj.

3. Konsisto. La Fakgrupo konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj.

4. Celoj. Konsciante, ke la valoro de Esperanto evidentiĝas en la eblecoj de interhomaj rilatoj pere de tiu lingvo, la Fakgrupo havas la celojn:

(a) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo, Esperanto,

kaj (b) plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj, same indiferente pri la nacieco, ŝtataneco, raso, religio, politika sinteno aŭ gepatra lingvo de la individuaj homoj, kiel pri la branĉo de komerco, ekonomia scienco aŭ alia aktiveco por kiu la rilatoj estas starigitaj.

La Fakgrupo provas atingi tiujn ĉi celojn per jenaj agadoj:

(i) apogado ĝenerale al ekzistantaj Esperantistaj organizaĵoj, kun aparte favora apogado al tiuj organizaĵoj kiuj aŭ instruas la lingvon aŭ provas ebligi pli altnivelan konon de la lingvo, per provizado de teknikaj vortaroj aŭ teknikaj studlibroj;

(ii) agadoj por ebligi kaj la eldonadon de faka terminaro aŭ fakaj terminaroj en la apartaj kampoj de komercaj rilatoj kaj ekonomiko, kaj la daŭran laboron ĝisdatigi tian terminaron aŭ tiajn terminarojn, sekve de lingva evoluado en la apartaj kampoj;

(iii) agadoj por ebligi renkontiĝojn de Membroj de la Fakgrupo, aŭ en la kadro de Universalaj Kongresoj aŭ alikadre, kaj por starigi studseminariojn je kiuj estu prezentataj referaĵoj pri esploroj faritaj en la apartaj kampoj de komercaj rilatoj kaj ekonomiko;

(iv) laŭebla subtenado de Membroj agantaj por aranĝi negocojn inter ĉiuspecaj organizaĵoj per uzado de la internacia lingvo;

(v) eldonado de faka bulteno por la Membroj de la Fakgrupo, aŭ de alia formo de revuo ĝenerale disponebla por ebligi komercajn rilatojn pere de la internacia lingvo, aŭ kaj laŭebla

/2

subtenado de aliaj revuoj kiuj montras ĝeneralan apogon al niaj celoj;

(vi) laŭebla subtenado de ĉiuj agadoj de Esperantistoj pli-akrigi konscion de la valoro de Esperanto en niaj apartaj kampoj de intereso, kaj

(vii) aplikado de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj alproksimigas la celojn de la Fakgrupo.

Por la plenumo de siaj celoj, la Fakgrupo rajtas akcepti aŭ akiri propraĵojn, akumuli kapitalon, fari investojn, ricevi rentojn aŭ kaj dividendojn el investoj faritaj kaj dungi kaj, eventuale, maldungi oficistojn.

5. Lingvo. La oficiala lingvo de la Fakgrupo estas la Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per la Fundamento de Esperanto kaj oficialigita per la Akademio de Esperanto.

6. Organizaj demandoj. La administra jaro de la Fakgrupo estas la kalendara jaro.

Pri la agoj de siaj reprezentantoj, oficohavantoj kaj oficistoj la Fakgrupo estas nur tiom respondeca, kiom tiuj agoj okazas laŭ la kompetenco kiun por ĉiu tia ofico difinas tiu ĉi Statuto.

Principe, la oficohavantoj okupas la koncernan oficon por la daŭro de tri jaroj post elekto, kaj estas nur unufoje reelekteblaj al la sama ofico, krom se pro aparta kaŭzo, (ekzemple, geografia), neniu alia Membro disponeblas al la Fakgrupo por okupi tiun oficon.

Ĉiaokaze, la Fakgrupo malakceptas financan respondecon pri la funkciado de la servoj proponitaj ekster la Fakgrupo flanke de tiuj oficohavantoj.

7. Membreco.

(i) Membroj de la Fakgrupo povas esti: (a) ĉiu individua persono kiu subtenas la celojn kaj pretas akcepti ĉiujn devojn priskribitajn en tiu ĉi Statuto, kaj (b) ĉiuspecaj organizaĵoj kiuj uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon, Esperanto, por komercaj rilatoj aŭ ekonomiaj interŝanĝoj.

Principe, ĉiu Membro havas la rajton je unu voĉo en iu voĉdonado, ĉu pri ŝanĝo en tiu ĉi Statuto ĉu pri iu alia decido, kiu leviĝas el aplikado de tiu ĉi Statuto.

Membreco aŭtomate implicas la devon finance kontribui regule al la mastrumado de la Fakgrupo.

(ii) Honoraj Membroj de la Fakgrupo povas esti tiuj individuaj personoj kiuj pro rekonataj meritoj por la Fakgrupo estas invititaj akcepti honoran membrecon sekve de unuanima decido de la ceteraj membroj dum ĝenerala kunveno aŭ pere de perpoŝta voĉdonado. Honora membreco ne implicas la devon fari regulajn kontribuojn al la kaso de la Fakgrupo.

8. Eksteraj rilatoj.

La Fakgrupo starigas kaj flegas kunlaborantajn rilatojn, laŭeble, kun organizaĵoj kiuj provas alproksimigi celojn similajn al tiuj de la Fakgrupo, kaj aparte kun la

/3

redaktoroj de la Esperanto-gazetaro.

9. Regado.

(i) La gvidado de la Fakgrupo estas konfidata al la Konsilantaro de IKEF. La Konsilantaro konsistas el Konsilantoj elektitaj de la Membraro el sia propra konsisto, tiel ke laŭeble ĉiu geografia regiono en kiu troviĝas Membroj ĝuu reprezentadon, sed ĝis maksimuma konsisto de unu kvinono de la Membraro. Konsilantoj estas individuaj personoj.

(ii) La Konsilantaro difinas la ĝeneralan agadon de la Fakgrupo, kaj publikigas ĉiujare raporton pri kaj la evoluado de tiu agado kaj la financaj konsekvencoj de tiu evoluado.

(iii) La Konsilantaro konfidas la ĉiutagan regadon de aferoj al la Estraro de IKEF. La Estraro konsistas el Prezidanto, Ĝenerala Sekretario kaj du ĝis ses aliaj Estraranoj,(inter kiuj lastaj unu aŭ du povas esti Vicprezidantoj, unu Financa Konsilanto kaj unu Redaktoro), ĉiuj elektitaj de la Konsilantaro el sia propra konsisto.

(iv) La Prezidanto reprezentas la Fakgrupon, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. La Prezidanto prezidas en la Konsilantaro kaj la Estraro, sed rajtas portempe transdoni tiun prezidan rolon al Vicprezidanto laŭ neceso.

(v) La Ĝenerala Sekretario: (a) zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Konsilantaro kaj Estraro, kaj (b) proponas al la Estraro iniciatojn por decido.

(vi) Principe, la Konsilantoj senkompense transdonas siajn laborojn al la Fakgrupo, sed rajtas ricevi el la kaso de la Fakgrupo sumojn rekte elpagitajn sekve de servoj faritaj.

10. Labormaniero.

(i) Laŭeble, la Konsilantaro kunvenas unufoje dum la jaro, en la kadro de ĝenerala kunveno de la Membroj. Neeblo okazigi efektivan kunvenon ne malvalidigas la laboron de la Konsilantaro, kondiĉe ke, per skriba voĉdonado perpoŝta, simpla plimulto de la Konsilantoj signas aprobon de la jarraporto en la tempodaŭro de ne pli longe ol dek tri monatoj post aprobo de la raporto por la antaŭa jaro. Ĉiaokaze, la aprobo de la jarraporto okazu en tempodaŭro ne pli longa ol dek unu monatoj post la fino de la koncerna administra jaro.

(ii) La Estraro kunvenas laŭbezone kaj laŭeblece; decidoj faritaj perpoŝte egale validas kiel decidoj dum kunsido. Principe, ĉiuj decidoj de la Estraro okazu unuanime, sed tio ne malebligas la sindetenon de voĉo flanke de individua Estrarano.

(iii) Malgraŭ la fakto, ke organizaĵo-membro ne havas la rajton elektiĝi al la Konsilantaro, tia membro rajtas anonci al la Estraro la nomon de individua persono kiu ĝuas la fidon de la koncerna organizaĵo kaj kiu pro tio rajtas reprezenti la organizaĵon. Tiaj reprezentantoj havas la rajton proponi al la Estraro skriban raporton pri la sinteno de la koncerna organizaĵo-membro pri iu iniciato sub diskutado; la Estraro havas la devon doni taŭgan konsideron al iu tia opiniesprimo.

(iv) //

(iv) Ĝeneralaj kunvenoj de la Membroj okazu principe unufoje dum la jaro, prefere en la kadro de Universala Kongreso aŭ simila manifestacio de la Esperantista publiko. La ĝeneralaj kunvenoj estas okazoj ne nur por doni aprobon al la jarraporto kaj elekti Konsilantojn, sed ankaŭ por aŭdigi kaj diskutigi referaĵojn pri fakaj esploroj faritaj de Membroj.
Ĉiam la nomoj de kandidatoj por elekto al la Konsilantaro estu publikigitaj en la organo de la Fakgrupo minimume du monatojn antaŭ la dato de la ĝenerala kunveno, aŭ maksimume dek tri monatojn post la okazigo de la elekto en la antaŭ jaro.
Elektoj de Konsilantoj okazas per skriba voĉdonado perpoŝta se ne eblas en aparta jaro okazigi ĝeneralan kunvenon.
Enoficiĝo de Konsilantoj kaj oficohavantoj okazas je la fermo de la kunveno en kiu la elektiĝo okazas, aŭ je la unua tago de la monato post tiu, en kiu perpoŝta voĉdonado finiĝas.

(v) Principe, ĉiu decido de la Fakgrupo estiĝas per simpla plimulto de la voĉoj, sen regulo pri minimuma nombro de voĉdonintoj, sed ŝanĝoj en la Statuto estas validaj nur se la plimulto estas tri-kvaronoj de la voĉoj dum voĉdonado en kiu simpla plimulto de la individuaj Membroj partoprenas. Nenio malhelpas, ke Membro propra iniciate agas por kolekti kaj al la Estraro transdoni skribajn atestojn de la sintenoj de Membroj, kiuj ne povas ĉeesti, kaj efektive ne ĉeestas, ĝeneralan kunvenon.

11. Financoj.

Membroj pagas al la kaso jarkotizon, en sumo kaj laŭ maniero aprobitaj de la Konsilantaro sekve de konsilo de la Estraro; manko de ricevo de tia jarkotizo en du sinsekvaj jaroj aŭtomate okazigas la eksiĝon de la koncerna membro.
Membroj rajtas fari pagon de jarkotizo en anticipo por pluraj jaroj kune. Se kaj kiam la sumo pagita tiel egalas al dudekoble la kotizo por la tiam kuranta jaro, tiu Membro aŭtomate fariĝas Membro dumviva, sed sen iu alia aparta privilegio.
La kason de la Fakgrupo prizorgas la Financa Konsilanto, (aŭ la Ĝenerala Sekretario en anstataŭo), kiu regule raportas al la Estraro ĉiujn elpagojn de sumoj egalaj al kvin jarkotizoj aŭ pli, kaj ĉiujn ricevojn de donacoj kaj anticipaj pagoj de kotizoj.
Laŭeble, la Konsilantaro, sekve de konsilo de la Estraro, aprobas la nomigon de Peranto de la Fakgrupo por iu aparta lando, kaj donas al tiu Peranto la rajton enkasigi por posta transpago al la kaso la jarkotizojn de la Membroj en la koncerna lando. Peranto rajtas esti nomita Peranto por pli ol unu lando, se apartaj kondiĉoj indikas la konsilindecon de tia aranĝo.

12. Dissolvo. En okazo de dissolvo de la Fakgrupo, la Konsilantaro, sekve de konsilo de la Estraro, nomas komisionon kiu likvidas la kurantajn aferojn de la Fakgrupo kaj ordigas la restantajn havaĵojn laŭ maniero indikita en la decido pri dissolvo, flanke de la Konsilantaro.

//

LM
Rotterdam,
1985-02-08.